

& Lastjuĝaj alvenis jam horoj:

< Rekante 15 el 29 batoj por strofo, entute 522 paŝoj dum 6 minutoj. Verkis Juraj Tranovský. El slovakaj tradukis Jiří Kořínek (Slovakaj antologio, 1977). Baladigis Martin Strid per feroaj melodio kaj rekantaĵo de Leiva balado (Leivur Össursson).>

(#Melodio:

<1,5:29> (

/mi miimimi reedodo doLa; doorere mimi mimi;mi miidodo dore redo doLa; doorere mimi mimi;

(#Rekantaĵe: redo do dore mi; mire dore mimi; mimi mimi; redo doLa do mi La a)

)×18)+

(& Strofoj:

'1 Lastjuĝaj alvenis jam horoj, ; fine la temp' ekestis, ; pri kiu Sinjor' kaj apostoloj ; ofte parol-atestis.

(×: **Paŝu firme sur plank', ; ŝuojn trivu ankaŭ, ; regu dio, ; kie dancos ni sen mank'.**)

'2 Ĉar fidezertigoj malpacaj ; sur sanktaj lokoj staras, ; kaj multas jam signoj minacaj, ; kaj kiuj timus raras.

'3 Ŝvelas antikrist' arogante ; kaj ĉashelpantoj liaj, ; al greg' de Sinjoro regante ; nur laŭ bontrovoj siaj.

'4 Li al misdecidoj herezaj ; tente devigi penas, ; al kiuj la koroj fidelaj ; tute enniel emas.

'5 Kaj kiu eĉ povas eldiri ; ĝenojn de ĉiu speco, ; kiujn devas multaj toleri ; kontraŭ ĉia justeco.

'6 Punpagoj kaj malliberejo ; kaj ankaŭ ekziligo, ; je eklezio-servij, komerco ; kaj je honor' senigo.

'7 En mond' estas multaj militoj, krio kaj sangobanoj, ; de pest' kaj malsat' turmentitoj, ; kaj estas fitiranoj.

'8 De tie plorego sur tero, ; pro ĝi popolo mortas ; sen scio pri voj' el mizero, ; kiun laŭ dev' ĝi portas.

'9 Kiel de l' regantoj maljusto, ; kiel inundi ĝi nin! ; Nobeloj la lupan aspekton ; prenas videble sur sin.

'10 La homoj entute arbitraj, ; malpiaj kaj miskultaj, ; avaraj, malsobraj, ruzemaj, ; fieraj kaj adultaj.

'11 Maljustaj kaj ekspluatemaj ; homoj kontrakt-rompemaj, ; sinamaj kaj nekompatemaj, ; trompe falsatestemaj.

'12 La malsincerec' kaj perfido ; tiuj sin alte levis ; kaj tial ke regas malbono ; sinki la amo devis.

'13 Najbaro turmentas najbaron ; kaj la amik' amikon, ; kaŭzante pro bagatelaĵo ; al li malfaciligon

'14 Kaj tial ne nur ekestadas, ; sed ĝi jam estas ĉe ni, ; ekestis jam tempo plej lasta, ; tago lastjuĝa venis.

'15 Ho Dio, vi Di' ĉiopova, ; estu kompata al ni! ; Por ke ni montriĝu vin indaj, ; ĉiam restadu kun ni!

'16 Kurtigu la tagojn ĉagrenajn ; por elektitoj viaj. ; Fariĝu de savo ni senaj ; sen via helpo Dia.

'17 Eliru la hela ekfulmo, ; volu Difil' jam veni ; promesinta siajn aglidojn ; en sian sinon preni.

'18 Amen, ni kantadu pri tio, ; kion ĵus celis peto, ; promesojn plenumos ja Dio, ; nur firmu ni en kredo.)